

Informoj pri aranĝoj : Tibor Sekelj, SES-tagoj kaj internacia pikniko
Claude Gacond, 294-a radioprelego, 1969.05.28 & 31

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni havas kelkajn gravajn informojn, kaj pro tio ni hodiaŭ interrompos nian prelegaron pri la temo geografia nomenklature. La venontan merkredon ni revenos al tiu demando per konkludaj vortoj. Kaj la postvenontan semajnon ni malfermos nian leterkeston, kiu estas plena.

A.- Semajnon post semajno ni vin atentigis pri la graveco de la debato malfermita de Tibor Sekelj per la eldono de *Mondmapo*. Tio verŝajne instigis nian esperantistan esploriston viziti Svislandon.

Cl.- La 31-an de majo kaj la 1-an de junio, okaze de lia traveturo en Neuchâtel, ni aranĝos esperantistan manifestacion, kies programon ni nun legas al vi.

A.- Post komuna vespermanĝo Tibor Sekelj prelegos sub la titolo *Ekspedicio en Amazonio* pri sia dujara kunvivado ĉe triboj de la brazila arbarego. Jen por la sabata vespero 31-a de majo.

Cl.- La dimanĉon Tibor Sekelj, sub la titolo *De Istanbul ĝis Pekino*, raportos pri sia trijara studvojaĝo tra Azio. Post tiu prelego kaj komuna tagmanĝo okazos ŝipa ekskurso sur la lago Neuchâtel ĝis la mezepoka urbeto Estavayer-le-Lac. Dum tiu veturo la esperantistoj, kiuj interesiĝas pri la laboro de Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto kaj pri la Geografia Nomenklature, povos malfermi etan debaton. La aliaj povos admiri la belan ĵurasan montaron kaj la ludojn de akvo babilante kun samideanoj.

A.- Ni esperas trovi la tempon por intervjui Tibor Sekelj. Tiel vi tutcerte havos la okazon aŭdi lian voĉon dum unu el la venontaj elsendoj.

Cl.- Alia aranĝo povos eble interesi esperantistojn, kiuj loĝas en la sama regiono. Ni jam raportis pri la starigo en la biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds de Centro de Dokumentado kaj Studado pri la Internacia Lingvo. La ĝeneva esperantista grupo La Stelo kaj la ĝenevano Paul Bouvier, bofrato de Edmond Privat, donacis al tiu Centro siajn arkivon kaj bibliotekon.

A.- La 15-an de junio, tio estas dimanĉo, okaze de internacia pikniko, kiun partoprenos la esperantistaj grupoj el Lausanne kaj Genève kaj al kiu ĉiuj estas kore invitataj, vizito de la Ĉambro Edmond Privat kaj de la dokumentaro de tiu Centro de Dokumentaro permesos al ĉiuj sin fari ideon pri la jam plenumita laboro. Poste trajna aŭ aŭtomobila veturo kondukos la partoprenantojn al paŝtejo por pikniko. Dum la posttagmezo okazos vizito de la naturrezervejo Le Bois-des-Lattes, interesege torfejo.

Cl.- Tiun ĉi jaron la semajnfino de Svisa Esperanto-Societo okazis en Solothurn la 1-an kaj 2-an de marto.

A.- Tiu manifestacio estis majstre organizita de sinjorino Doris Schmid. La sabatan posttagmezon pluraj klasejoj de la komerca lernejo estis je nia dispono. Tiel samtempe pluraj kunsidoj povis grupigi la esperantistojn laŭ la interesoj.

Cl.- En unu klasejo kandidatoj trapasis ekzamenojn.

A.- En alia komencantoj grupiĝis por konversacii.

Cl.- En tria la kasistoj kaj prezidantoj de la lokaj grupoj diskutis siajn problemojn.

A.- Post unu horo la kongresanoj estis invitataj veni aŭdi prelegon pri Grekio. Bernard Hemman, juna esperantisto, prezentis kaj komentis diapozitivon, kiujn li fotis okaze de

Informoj pri aranĝoj : Tibor Sekelj, SES-tagoj kaj internacia pikniko
Claude Gacond, 294-a radioprelego, 1969.05.28 & 31

studvojaĝo en tiu bela lando. Ni vidis, kiel tiuj gelernantoj tranoktis sub la ĉiela tegmento apud la plej belaj monumentoj de la antikvaj tempoj.

Cl.- Kaj poste ni forlasis la antikvecon por la baroka stilo. Solothurn posedas belegan preĝejon, kiun sinjorino Doris Schmid nin detalege vizitigis. Orgenkoncerto konkludis tiun agrablan momenton.

A.- Centre de la urbo, tute proksime de nia kongresejo, librovendejo ekspoziciis esperantajn librojn. Kaj la gazetaro de la urbo anoncis nian manifestacion per artikoloj, kiuj atentigis la legantaron pri la valoro de la lingvo internacia. Pro tio tiu esperanto-kongreso vekis la intereson ne nur de la publiko, sed ankaŭ de televidaj reporteraj.

Cl.- Post komuna vespermanĝo, dum la deserto, du aŭ tri reporteraj filmis kaj registris diversajn kongresanojn kaj la prezidanton de Svisa Esperanto-Societo. Por nia movado, tio estis io nova.

A.- Doktoro Werner Berger poste prelegis en la germana pri la homaj rajtoj. Kun pluraj kongresanoj ni kritikis tiun programon. Svislando estas kvarlingva nacio. Kaj ĝuste pere de esperanto ni provas solvi niajn lingvajn malfacilaĵojn. Kial do aranĝi prelegon en nacia lingvo, kiu povas esti komprenata nur de parto de la ĉeestantaro ?

Cl.- Ni povis konstati, ke la svisaj esperantistoj estas pli babilemaj ol dancemaj. Ĝis malfrue vespere ili diskutis en grupetoj anstataŭ sin movi dance.

A.- La dimanĉon ni ne povis partopreni tiun kongreson. Sed ni scias, ke la jarkunveno de nia Svisa Esperanto-Societo plej agrable disvolviĝis. Sinjoro Werner Laederach el Zürich daŭre estos la prezidanto de tiu societo, kiu bone progresas.

Cl.- Por fini nian raporteton pri la esperanta vivo en Svislando, ni deziras prezenti al vi la programon de interesa manifestacio okazonta de la 24-a ĝis la 30-a de aŭgusto en Gwatt ĉe la lago de Thun. Temas pri la 11-a Internacia Ferio-Semajno organizita en Svislando de Svisa Asocio de la Esperanto-Fervojistoj. Jen tiu programo :

A.- 24-an de aŭgusto : Vizito de la historia parto de la urbo Thun.

Cl.- Lunde 25-an : Vizito de la fama lageto Blausee (blua lageto). Lumbildvespero.

A.- Marde 26-an : Tuttaga ekskurso per trajno al Simmen-valo kun pendfervoja supreniro al la monto Rinderberg je alteco de 2000 metroj.

Cl.- Merkrede 17-an^o: Vizito de la urbeto Spiez kaj ekskurso al Beatenberg-Niederhorn je alteco de 2000 metroj. Vespere ni havos la honoron doni prelegon pri la svisa historio kaj svisa federalismo.

A.- Ĵaŭde 28-an^o: Kulmino de la semajnarangĝo kun ekskurso al Lauterbrunnen, Grütschalp kaj Mürren kun atingo de Schilthorn je alteco de 2970 metroj.

Cl.- Post ripoztago la semajna aranĝo finiĝos per vizito en Luzern de la Trafika Domo. Jen bela kongreso, kiun ni konsilas al vi, se vi deziras konatiĝi kun Svislando.

A.- Por ricevi ĝian programon simple skribu al Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj, Brugg, Svislando, aŭ al Radio-Svislando.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-